


Hildegardis de Bingen

kaj ŝia *lingua ignota*

De Andreas Künzli



Antaŭ preskaŭ 920 jaroj (en la jaro 1098) naskiĝis la germana abatino Hildegardis. Ŝi inventis la idiomon *lingua ignota* (nekonata lingvo) kaj la signaron *litterae ignotae* (nekonataj literoj), kies signifo ĝis hodiaŭ ne estas tute klara. Kelkaj interlingvistoj vicigis tiujn du sistemojn inter la fruaj provoj krei planlingvon. Sed ĉu prave kaj rajte?

Lastatempe ofte menciata, ĉar remalkovrata sed ĝenerale malmulte konata, sankta Hildegardis (1098-1179), jam en sia tempo famega abatino de Rubertsberg apud Bingen en germana Rejnlando, elstaras antaŭ ĉio kiel admirinda kaj progresema ina figuro de la mezepoko, kiel historia fenomeno surtabliganta multajn enigmojn kaj demandojn. Por iuj, Hildegardis lokiĝas inter la grandaj religiaj mistikulinoj, aliaj adoras ŝin kiel filozofinon, verkistinon, muzikistinon, pentristinon kaj artmetiistinon, denove aliaj gloras ŝin kiel sciencistinon sur la kampo de la herb-naturkuracado, por aliaj Hildegardis signifas eĉ la protagoniston de la virina emancipiĝo entute. Do, taŭga referenc- kaj esplor-persono por kovri la subjektivajn interesojn de plej diversaj nostalgiuloj kaj fanatikuloj kun pseŭdosciencaj trajtoj kaj esoteraj inklinoj. Ĉiukaze, Hildegardis mem estas multflanka personeco el fora tempo, kiu por ni estas apenaŭ plu komprenebla.

En 1998 plenumiĝis la 900-jara datreveno de sia naskiĝo – dato donanta sufiĉe da okazoj por omaĝi kaj explore reokupiĝi pri tiu iom mistera sed sendube tre kapabla, se ne genia monaĥino, kiu eĉ disradiis influon al politikistoj kaj ekleziuloj de sia epoko. Sciencaj esploroj konkurencas kun nekritikaj, mitigaj verkaĵoj. Ĉefe en Germanlingvio, la patrio de la abatino, aperis novaj studoj pri Hildegardis. Bedaŭrinde, kutime ili ne atentigas unu gravan flankon de la vivo kaj agado de Hildegardis: ŝian lingvokrean aspekton. Pri kio temas?

En sia *Historio de la Mondlingvo* (eld. 1991, p. 71), Ernest Drezen menciis Hildegardis dirante, ke ŝi *prilaboris eĉ tutan sistemon de universala skriba kaj parola lingvo ignota lingua simplicem hominem Hildegardem prolata...* [kiu] *memorigas laŭ sia strukturo projektojn de la 19a jarcento. Ĝia alfabeto havis 32 literojn kaj la tuta vortaro enhavas ĝis 900 vortojn.*

Unuavide, *lingua ignota* aspektas kiel tuteca lingvosistemo aŭ speco de planlingvo, kaj en interlingvistiko ĝi ofte estas prezentata kiel tia, se ne kiel sekreta lingvo (ekzemple en *Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki* de A. Duliĉenko (Tartu 1990, p. 24), kiu baziĝis siavice sur la verkoj de Drezen, de Bruin, Monnerot-Dumaine, k.a., kie *lingua ignota* estas listigita sub aprioriaj lingvosistemoj. En sia kritika artikolo en *Sciencaj Studoj* (1958, p. 57-59), W.J.A. Manders atentigis, ke la informoj de Drezen estas preskaŭ senescepte falsaj. Ne temas pri tuta sistemo, sed pri nura glosaro. La alfabeto ne havas 32 literojn, sed 23, la vortaro ampleksas pli ol 1000 vortojn, kaj el la cititaj ekzemploj de Drezen kelkaj estas neĝustaj. Sed pli gravaj ol ĉi tiuj konfuzaj detaloj estas la supozo aŭ eĉ konvinko aŭ konstato de Manders, ke *lingua ignota* tute ne estis kaj ne pretendis esti lingvo universala. Ankaŭ la asertoj de Edgar J. Smith en ties artikolo 'Internacia Lingvo' en *The British Esperantist* (junio 1958, p. 259-260),

ke la unua provo konstrui „mondlingvon“ estis la verko de virino, kiu celis simpligi la latinon kaj reguligi ĝian gramatikon kaj nebule antaŭvidis la sistemon de la neŝanĝiĝantaj afiksoj de Zamenhof, ktp., apartenas al la mondo de la legendoj.

En sia teksto ‘Kvar planlingvoj kreitaj de virinoj – ignota lingua, Homografio, Glosa, Uni’, aperinta en *La Fenomeno* (5, 1988, p. 10), Bernard Golden aldonis senkomente pri *ignota lingua*, ke la fama germana planlingva pioniro *Leopold Einstein* konjektis, ke tiu lingvo, kiu estis kreita dum la periodo de la krucmilitoj, devis servi kiel nova pentekosta miraklo por religia entuziasmiĝo de la tiutempa malklerularo. Do, nur konjekto, kaj la sola serioza kontribuo pri *lingua ignota* en Esperanto restas tiu de Manders el la jaro 1958. Kvankam ĝi ne estas tro profunda, mi tamen rekomendas al ĉiu interesito relegi ĝin.

Interesajn, iom pli sciencajn interpretojn pri *lingua ignota* publikigis lastatempe Helene M. Kastinger Riley, kies studoj aperis en volumeto de la ŝatata germanlingva biografio serio rororo (Hildegard von Bingen, Rowohlt 1997, 2011). En tiu ĉi libreto la aŭtorino dediĉis apartan ĉapitron al *lingua ignota*. Ankaŭ ŝi kredas, ke la origino aŭ genezo de tiu lingvistika verko de Hildegardis ankoraŭ ne estas malenigma.

Hildegardis mem envicigis la lingvon en la verko ‘*Liber vitae meritorum*’ (Libro de la vivmeritoj) kadre de siaj di-viziaj verkaĵoj, kiuj estis komencitaj, kiam ŝi atingis la maturan sesdekjaram aĝon. Ni posedas ĝin en tri redaktaj versioj – viena, wiesbaden-a kaj berlina. La fontproblemoj similas al tiuj de la leteroj de Hildegardis. En la tri manskribaĵoj de Hildegardis estas menciita ankaŭ sistemo konsistanta el 23 literoj. Do, temas pri du aferoj en si mem tamen koheraj: *lingua ignota* kaj *litterae ignotae*. Ĉiuj Hildegardis-esploristoj akcentis la centran signifon de vorto kaj skribo en la viziaj verkaĵoj de la abatino. Oni ligas ilin kun la simbolismo de la dia revelacio kaj kun la simbolismo de la ciferoj. Por Hildegardis, la miraklaj verkoj de dio negative respuguliĝas en la magio de satano. En ‘*De operatione Dei*’ (La verko de Dio) ŝi aludis la „revelaciojn“ de la diablo per la sekvantaj vortoj: *Tiu ĉi engravurigos skrib-literojn en la frunton de siaj adeptoj. Per tio li endesegnas ĉian fion en ilin. Ĉi tiu skribo pli frue estis vidita aŭ elpensita en neniu lingvo. Lucifero elpensis ĝin en si mem kaj elportas ĝin el la perfido por tenti la homojn. Nome la filo de la ruiniĝo asertas: la fortranĉita ligno devas esti deponata ĝis kiam iu artisto rekunligas kaj ornamas ĝin, por ke ĝi trovu la admiron de la aliaj, tiel estu senklora ankaŭ la nature naskita homo, ĝis kiam li estu laŭdita per tiu skribo, ĉar en ĝia karaktero kaŝiĝas pli da graco kaj povo ol en la kreado de la homo. Sed Dio detruos ĉiujn tentojn per tiu skribo kune kun ĝiaj kreantoj; la Skribo de la Sankta Spirito ne forpasos.*

Por Kastinger Riley tiuj ‘pravigoj’ de *lingua ignota* kaj *litterae ignotae* rezultigas pli da demandoj ol respondoj. Ĉu ekzemple „pli frue“ (ĉi tiu skribo pli frue estis vidita aŭ elpensita en neniu lingvo) signifas „antaŭ la Plej Lasta Tribunalo“ aŭ antaŭ la di-vizioj de Hildegardis? Ĉu estas signife, ke la vortoj por diablo, *diuueliz*, kaj trono, *diuloz*, sonas tiel simile? Ke la vortoj estas frikativaj, siblaj, missonaj? Ĉu gravas iu alfa-omega-simbolismo, nome ĉar la fina litero de nia alfabeto, la frikativo *z* (esp. prononc. *c*) aperas tiel ofte? Kial *lingua ignota* konas nur substantivojn kaj ne posedas verbojn? Ke tiuj substantivoj esprimas nur aĵojn respektive objektivojn kaj ne permesas abstraktan pensmanieron? La metafora uzado de lingvaj rimedoj ŝajnas evidenta. Kaj kial la lingvo estis nomita ‘nekonata’ kaj la literoj ‘nekonataj’? Do, kiucele Hildegardis entute kreis tiun lingvon, tiujn literojn?

La substantivoj de *lingua ignota* montras en sia konstruo ian sistemon de radikoj kaj afiksoj (pre- kaj sufiksoj) formantaj parencajn vortojn. En la manskribaĵoj de Hildegardis la vortkreaĵoj estas tradukitaj grandparte ankaŭ en la latinan lingvon kaj en la mezaltgermanan dialekton de Rejnlando. Fakte ankaŭ Kastinger Riley supozas, ke *lingua ignota* eble estis uzata kiel ia sekreta lingvo, eventuale por sendi kaŝitajn mesaĝojn. Pri tio oni trovas ununuran pruveblan dokumenton pere de iu leteradreso. Laŭ iuj esploristoj (Portmann kaj Odermatt), tio servis por *kaŝi la leter-ricevonton antaŭ fremduloj*.

Filologoj kaj slavologoj eble rimarkas aŭ supozas paralelon inter la literoj de Hildegardis kaj la verko de Konstantino-Kirilo el Tesaloniko, kiu inventis en la 9a jarcento specialajn literojn por la lingvoj de la slavaj popoloj, sed en tiu ĉi kazo la celo de la entrepreno estis tute klara. Ĉu Hildegardis eventuale estis inspirita de tiu verko, aŭ eĉ de la skribo armena, kartvela aŭ runa, almenaŭ laŭ principo aŭ ideo, kaj lige kun la disvastigo de la kristanismo? Rekoneblaj estas gotaj elementoj,¹ kaj okulfrapan similecon la literoj de Hildegardis montras eĉ kun la siria skribo.² Aŭ ĉu temas pri nura fantazio? Malfacile diri.

¹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Gotisches_Alphabet.

² Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Syrisches_Alphabet.



Literoj (*litterae ignotae*) de Hildegardis kaj *Glagolico* de Konstantino-Kirilo
 Sube: literoj de la armena, kartvela kaj runa alfabetoj

Մ	Յ	Ն	Շ	Ո	Չ	Պ	Ջ	Ռ	Ս	Վ	Տ	Ր	Ց	Ի	Փ	Ք	Օ	Գ
մ	յ	ն	շ	ո	չ	պ	ջ	ռ	ս	վ	տ	ր	ց	ի	փ	ք	օ	գ
m	j	n	sch	(w)o	tsch	p	dsch	rr	ss	w	t	r	z	w/u	p	k	o	f

Տ	Ծ	Զ	Ը	Ժ	Յ	Շ	Չ	Պ	Ջ	Ռ	Ս	Վ	Տ	Ր	Ց	Ի	Փ	Ք	Օ	Գ
ani	bani	gani	dani	eni	vini	zeni	t'ani	ini	k'ani	lazi										
a	b	g	d	e	v	e	t'	i	k'	l										
Ձ	Բ	Ծ	Յ	Շ	Չ	Պ	Ջ	Ռ	Ս	Վ	Տ	Ր	Ց	Ի	Փ	Ք	Օ	Գ		
mani	rari	oni	p'ari	zeni	rae	sani	t'ani	uni	p'ari	k'ari										
m	n	o	p'	z	r	s	t'	u	p'	k'										
Ը	Ժ	Յ	Շ	Չ	Պ	Ջ	Ռ	Ս	Վ	Տ	Ր	Ց	Ի	Փ	Ք	Օ	Գ			
gani	qari	shini	chini	ts'ani	dzili	ts'ili	tsh'ari	xani	jani	hae										
g	q	sh	ch	ts'	dz	ts'	tsh'	x	j	h										

A=	Բ	H=	Ի	O=	Լ	V=	Ք
B=	Բ	I=	Ի	P=	Լ	W=	Ք
C=	<	J=	Լ	Q=	<	X=	<=>
D=	Բ	K=	<	R=	Բ	Y=	Յ
E=	Բ	L=	Ի	S=	Լ	Z=	Յ
F=	Բ	M=	Բ	T=	Ի	TH=	Բ
G=	X	N=	Ի	U=	Բ	NG=	Բ

Do, bela sed kaprompa kuriozaĵo post kuriozaĵo, enigmo post enigmo. Kaj finfine oni ne devus forgesi sin demandi, ĉu Hildegardis sola kreis tiun lingvon kaj tiujn literojn. Ĉar *lingua ignota* prezentas unikan lingvodokumenton de la 12a jarcento, tiu idiomo estas interesa ne nur por la historia lingvistiko, sed ankaŭ el kulturhistoria vidpunkto. Ĝia vortaro ampleksas riĉan trezoron de nocioj de la ĉiutaga uzado (dommastrumado, milito, vestaĵoj kaj personaj posedaĵoj). Ne laste, la lingvaĵo de Hildegardis gravas en la kunteksto de ŝiaj natur- kaj kultursciencaj verkaĵoj, ĉar ĝi enhavas nociojn el la kampo de homaj korperoj, malsanoj, plantoj, bestoj ktp. Cetere, Hildegardis komponis ankaŭ muzikon – lingvo kaj muziko estas tre proksimaj disciplinoj subtenantaj unu la alian.

Do, restas la konkludo postuli, ke onte la Hildegardis-esploristoj donu pli da atento al *lingua ignota* kaj *litterae ignotae* por heligi la enigmojn de la sanktulino Hildegardis de Bingen. Faka literaturo pri *lingua ignota* kaj *litterae ignotae* estas rara. Indus legi la libron de Sarah L. Highley, kiu aperis en Novjorko en 2007 por kompletigi ĉi tiun artikolon.

Uzitaj fontoj kaj resursoj:

Vortaro: <http://www.unmasqued.com/eclecticify/ignota.php>

Literoj: <http://www.fonts2u.com/litterae-ignotae.font>

M. Kastinger Riley, aŭtoro kaj libro:

https://de.wikipedia.org/wiki/Helene_M._Kastinger_Riley

<http://www.rowohlt.de/taschenbuch/helene-m-kastinger-riley-hildegard-von-bingen.html>

Vikipedio: https://de.wikipedia.org/wiki/Hildegard_von_Bingen

Aliaj verkaĵoj (dume ne konsultitaj):

Sarah L. Highley (Hrsg.): Hildegard of Bingen's unknown language. An edition, translation and discussion. Palgrave macmillan, New York 2007.

Wörterbuch der Unbekannten Sprache (Lingua ignota). Hildegard von Bingen; in der Reihenfolge der Manuskripte, sowie alphabetisch nach Unbekannter Sprache, lateinischer Übersetzung, mittelhochdeutscher Übersetzung und moderner Übersetzung, unter Mitarb. von Marie-Louise Portmann und Alois Odermatt. Basel. Verlag Basler Hildegard-Gesellschaft, 1986. 92 p.